1 MARTO 1908 Unu Numero : 10 CENTIMOJ (4 Spesdekoj) KVARA JARO. – Nº 26

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO
Unu Jaro . . . . Sm. **1.20** | Helpabono . . . . Sm. **4.—**
Spesmilo (Sm.) = 100 Spesdekoj (Sd.) = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj = ½ dolaro = 1 rublo = 2,40 kronoj aŭstr = 1,80 kronoj Skand (proksimume).

Oni abonas ĉe la Administrejo
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

REKLAMO
1 paĝo . . . . Sm. **100.—** ‖ ¼ kolono . . . Sm. **7.—**
1 kolono . . . . » **25.—** ‖ ⅛ » . . . . » **4.—**
½ » . . . . » **13.—** ‖ 1/16 » . . . . » **2.50**
25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj
Ĝeneralaj Agentoj : G. WARNIER, 46, Rue Sainte-Anne, **Paris-2ᵉ**
C. A. L. BROWNE, 53, Wych Street, **London W. C.**

Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj

La propono pri la kreo de konsuloj, tio estas de personoj povantaj liveri ĉiuspecajn informojn al la publiko esperantista, estis unue prezentita de S^ro Carles, el Beziers, al la dua universala kongreso de Esperanto, kiu ĝin favore ekzamenis kaj akceptis, sed decidis lasi la kreon kaj aranĝon de tiuj organizajoj al la libera iniciatemeco de la grupoj aŭ privatuloj. Preskaŭ en la sama tempo, alia el niaj kunlaborantoj, S^ro Th. Rousseau, instigis en diversaj lokoj la fondon de tiel nomataj Esperanto-Oficejoj, kiuj celis utiligi Esperanton ĉefe al la neesperantista publiko ; jam en kelkaj urboj kreiĝis tiaj organoj, kiuj post malmulte da tempo liveris tute kontentigajn rezultatojn. Post unu jaro, jam ekzistis pli ol cent konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj en ĉiuj landoj, sed ĉar multaj el ili estis organizitaj laŭ plano ne sama, ĉar ekzistis inter ili nenia oficiala kaj komuna ligilo, la sperto baldaŭ montris la neceseecon de interkonsento internacia por ilia organizo kaj funkciado. Pro tio, la diversaj personoj, kiuj ĝis nun sin okupis pri tiu temo, kunvenis dum la III^a kongreso kaj interkonsentis pri la ĉefaj punktoj koncernantaj la kreon, taskon kaj funkciadon de tiaj oficoj. La rezultato de tiuj laboroj, frukto de multaj diversaj eksperimentoj, estos publikigata per speciala broŝuro (¹). Por niaj legantoj, ni tute maldetale skizos la strukturon de tiu nova utilega organismo.

En ĉiu loko, kie estas kelkaj Esperantistoj ekzistas *Esperanto-Konsulo* (²), elektita laŭeble de la tieaj Esperantistoj. La Konsulo reprezentas oficiale la Esperantistojn de sia regiono, helpas laŭpove al la fremduloj Esperantistaj, kiuj trapasas lian urbon, sin okupas pri ĉiuj praktikaj aplikajoj de Esperanto, liveras informojn pri la enlanda turismo, komerco, industrio, k. t. p. En ĉiu urbeto aŭ vilaĝo de sia regiono, li devas trovi korespondantojn aŭ subkonsulojn, kiuj laŭbezone helpos lin en lia tasko kaj liveros al li la necesajn informojn. Li mem elektas siajn kunlaborantojn kaj kunhelpantojn inter la lokaj Esperantistoj kaj partigos al ili difinitan taskon, se li mem ne povas ĝin plenumi.

Plie, la eksperimentoj jam faritaj en multaj urboj pruvis, ke oni ricevas grandan utilon, kreante ejon, en kiu oni alcentrigas ĉion, kio koncernas Esperanton. Tiu kreo multe pligrandigis la agadon de ĉiuj Esperantistoj aŭ esperantistaj organizajoj kiuj en kelkaj lokoj nur nome ekzistas. La *Esperanto-Oficejo*, kies funkciadon ni jam klarigis tie ĉi, estas ĝenerale magazeno sidanta sur tre vizitata strato. En ĝi ĉiu Esperantisto trovos la plej necesajn esperantajojn (libroj, jurnaloj, ŝlosiloj, signoj, k. a.), kiujn li alimaniere ne povas facile aĉeti ; en ĝi ĉiu fremdulo povos ricevi la Esperante redaktitan gvidfolieton, per kiu li povas koni la plej necesajn informojn pri la urbo kaj la nomojn de la Esperantistoj, kiuj sin proponas por lin helpi ĉe lia trapasado ; sur ĝia afiŝejo, ĉiu samideano povas legi la novajojn, kiuj koncernas nian movadon kaj la informojn praktikajn de la ceteraj Oficejoj en la mondo ; al ĝia komuna adreso, ĉiu povos skribi por kiu ajn Esperantisto en la urbo, ĉiu komercisto povos sin turni por tradukigi siajn komercajn reklamojn, kiuj estos dissendataj ĉien per la diversurbaj Esperanto-Oficejoj. La signifo de tiuj kreajoj estas do tre granda por la enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon kaj la praktikajn rondojn. Flanke de tio kaj post ĝia starigo, oni povas organizi aliajn entreprenojn ankaŭ tute rekomendindajn, kiel la presigo de alloga gvidlibro de la regiono, la kreo de komerca kaj industria sekcio de la grupo, enhavonta ĉiujn negocistojn, kiuj uzas la servojn de la konsulo kaj Esperanto-Oficejo, la organizon de kompetenta tradukistaro, k.t.p. lom post iom, tiuj servoj, kiuj en la komenco estas tre malgrandaj, kreskos kaj plivastiĝos laŭ ĝojigaj proporcioj. Nia movado, kio ajn okazos, estos tiam tute ne ŝancelebla, ĉar ĝi havos kiel fundamenton ne nur la fidelecon kaj sindonemecon al ia ideo, sed la bezonon de la homoj-kio estas konstanta kaj certa, kaj al la homoj, kiuj volas veni al ni, ni povos prezenti faktojn, kiuj pruvas la estantan utilecon de Esperanto, kaj ne nur lulantajn frazojn pri la estonta signifo de nia afero.

La internacia organizajo, kiu nun estas en kreiĝado, havos kiel unuan taskon la definitivan starigon de konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj kun la dependantaj servoj en [illegible] plej granda nombro da lokoj. N[illegible]n grupojn kaj ekzistantajn or[illegible] esperantistajn ke ili direktu sia[illegible]on laŭ tiu vojo kaj laŭpove kun[illegible] por la granda kaj fruktodona tasko, kiu estas nun proponata al ili.

H. H.

TRA LA MONDO

AŬSTRIO

Praho, februaro 1908.

La nova jaro alportis al la imperio la parlamentan aprobon de la Aŭstra-Hungara kontrakton por reciprokaj komercaj kaj limimpostaj rilatoj por daŭro da dek jaroj, kaj al la ministraraj prezidantoj altajn honorinsignojn pro lerta forigo de malhelpoj. Per tio estas firmigata la imperia unueco ĝis 1917. Sed tamen nek en la parlamentaj agadoj, nek en la jurnalistaj artikoloj tiu fakto estas rigardata kiel argumento de vivemeco por la dualisma imperia konstitucio ; eĉ la ministraj deklaracioj enhavas kaŝitajn rimarkojn pri la ebleco de limimposta disiĝo. En Hungarujo, oni pri la kontrakto direkte proklamis, ke ĝi estas disiĝa kompromiso, kaj en Aŭstrio la defendantoj de la kontrakto montris kiel bonajon la fakton ke ĝi donas la povon prepariĝi je ĉiuj ajn cirkonstancoj, kiuj povas okazi la 31^an de decembre 1917. Unu parto de la fundamenta unueco de la imperio estas do ne tre forta ; sed ankoraŭ pli evidenta estas la nesufiĉeco de kompromisaj leĝoj de 1867 pri la stato de la banknota banko, kiu ĝis nun estas komuna por ambaŭ duonoj, sed kies unueco tute ne havas ian leĝan fundamenton. Ke por ĝi ne estis verkitaj almenaŭ similaj leĝoj kiel por komerca kaj dogana unuecoj, ŝajnas estis rezultinta el tio, ke la bezono verki reciprokajn leĝojn pri la ŝtata banko estis sentata ne jam en 1867, sed nur en 1878, kiam ĉesis la tria privilegio donita por ĉiuj provincoj de la imperio al Aŭstra nacia banko fondita en 1816. Sed tiam la situacio de Hungarujo estis jam tiel grava, ke oni tiam sendispute konsentis pri la rajto apartenanta al ambaŭ imperiaj duonoj fondi memstaran banknotan bankon. De tiam nur per tute libera kontrakto de ambaŭ ŝtatoj, la banknota privilegio estis donata al unu akcia societo, kiu sekve fariĝis komuna institucio de ambaŭ imperiaj duonoj, sed nur tute libere. Kompreneble en tiu stato, dum la neekzisto de leĝaj kaŭzoj por la banka unueco, lertaj Hungaraj politikistoj nur kompromise konsentis kun banka unueco kaj faradis el ĝi objekton de politika komerco, en kiu la Aŭstria parto ĉiam malgajnis, ĉar ĝi kunigadis siajn interesojn kun interesoj dinastiaj, kaj ĉiam defendadis la imperian unuecon. Dum tia leĝa kaj reala situacio oni agis pri renovigo de banka unueco, kiu finiĝas la 31^an de decembro 1900, ĉe konsilado pri renovigo de unueco dogana kaj komerca en septembro 1907. La Hungaraj radikalaj nacionalistoj starigis la postulon de memstara hungara banko. Kontraŭ tio, la Aŭstria ĉefministro Beck penis konservi la bankan unuecon aŭ almenaŭ verki ĝiajn leĝajn kondiĉojn mankantajn en leĝoj de jaro 1867, jam pro tiu kaŭzo, ke li post la fino de la privilegio ne devus pagi la Hungaran komplezon per politika koncedo. La rezultato de la konsilado estis, ke la banka problemo restis ne solvita, sed la devizo de la Aŭstra duono estis akceptita en kontrakta komisio per formulo de d. ro Benedikt, eldonanto de *Neue Freie Presse*. Jen ĝi estas : « Se pro ia ajn kaŭzo, la nuna privilegio ne estas renovigita almenaŭ ĝis fino de 1917, ambaŭ registaroj, antaŭ nova aranĝo de banknota banko, kiu estos poste necesa, faros decidojn taŭgajn por certigi la verkon de kontrakto pri dogana kaj komerca unueco, kaj precipe por malhelpi, ke la kondiĉoj de libera komerco inter ambaŭ ŝtatoj estu malbonigitaj aŭ detruitaj per rezultatoj elirantaj el eventuala mona kurso. » En tio jam estas fiksitaj la politikaj celoj de la Aŭstra registaro kaj Hungara parlamento en ilia nuna konsisto. Laŭ la nuna situacio, dum la agado pri banka privilegio, en Aŭstrio la parlamento, en Hungarujo la registaro devos starigi vidpunktojn ekonomiajn kontraŭ tendencoj ekskluzive politikaj, ĉar la Hungara registaro ne volas akcepti respondecon pri gravegaj ekonomiaj efikoj de politika radikalismo, kaj la Aŭstra parlamento balotita laŭ la universala balotrajto ne volas pagi la imperian unuecon per la mono de la balotintoj.

S. K.

BRAZILIO

Rio-de-Janeiro, januaro 1908.

Pri la enlanduloj Braziliaj oni preskaŭ ĉiam aŭdas paroli kun sento de timego. Efektive, ne malofte okazas, ke izolaj koloniigantoj, esploristoj estas viktimoj de iliaj longaj sagoj venenitaj per la terura « curare ». Antaŭ kelkaj semajnoj, virino kaj du junaj infanoj estis mortige frapitaj dum la foresto de la viroj, kiuj suspektis nenian danĝeron. Tiuj krimoj estas kutime aljuĝataj al natura krueleco de la enlanduloj, al instinkta sento de l'mortigo por simpla plezuro. Tial, por la regnestraj aŭtoritatoj, la enlanduloj ne ekzistas kiel viroj. Se oni sin okupas pri ili, ĝi — krom kelkaj laŭdindaj esceptoj — estas nur por ilin detrui. Por la Brazilo aŭ la fremdulo, ili estas nenio pli ol sentaŭguloj. Kaj tamen, la personoj kiuj konas la enlandulojn unuanime deklaras : la kruelajoj de la sovaĝuloj neniam estas spontaneaj, ili ĉiam estas revenĝoj, kvankam la viktimoj estas ofte tute senkulpaj rilate al la persekutado de la enlanduloj. La klarigo de tiu fakto estas simpla : sovaĝulo neniam ion faras, ne avertinte la gentestron kaj ricevinte la konsenton de la tuta gento. Pro infana, sed ja natura, analogio, la enlanduloj supozas, ke la blankuloj havas tian saman kutimon, kaj kiam unu el tiuj ĉi faras al alia ian kruelajon, ili pri tio kulpigas ĉiujn civilizulojn de la regiono. Tiam la leĝo de la revenĝo agas laŭ sia plena severegeco. La gento estos trankvila nur kiam la devo de la revenĝo pro la mortigitoj estos tute plenumita. Tial, kiu mortigas aŭ forprenas enlandan viron, virinon aŭ infanon, tiu estas certa, ke samamomente li kondamnas al morto viron, virinon aŭ infanon de sia raso. Tiu kutimo, konata de la civilizuloj rilatantaj kun la enlanduloj, ilin tamen ne tuŝas. Ne parolante pri la militiroj plimalpli oficialaj, la « ĉaso al la sentaŭguloj » estas malfermata dum la tuta jaro. Germano koloniiganto, nome Schroder, diris al natursciencisto Schreiner, kiu deziris havi ostarojn de enlanduloj, ke multaj estas enfositaj en lia ĝardeno, ĉar por sin instali li devis mortigi multajn el ili : efektive, ili obstine trapasis sian malnovan ĉaslandon malgraŭ la nova enloĝanto. En alia regiono, enlandulino, kun infano ĉe la mamo, pasinte ĉe la bordo de rivero, ricevis el barko pafon de plumbo, kiu mortigis la infanon kaj ŝin kruele vundis ; ŝi plendis, sed kompreneble tute vane [1].

Tiuj neutilaj kruelajoj estas la plej granda baro por la pacigo de la enlanduloj. Antaŭ kelkaj jaroj, la komercistaro de Rio Madeira sin turnis al S-ro Bartosa Rodrigues por peti, ke li rilatiĝu kun gento. La eminenta sciencisto, ĉiam preta por siaj arbaranaj amikoj, estis forironta, kiam li per la jurnaloj eksciis la jenan fakton . kelkaj « sortanejos [2]), vidinte enlandulojn trapasantajn riveron per barkoj, sekvis iliajn postesignojn kaj alvenis al la ĉefvilaĝo. Ili tie trovis multajn virinojn kaj infanojn, kiujn ili mortigis kaj kies domojn ili bruligis. La gazetaro multe laŭdis tiunagon, sed d-ro Barbosa ne plu volis foriri al la postvivantoj, kies koleron oni facile komprenos. « Gi estis male — li diris — bonega okazo por akiri la konfidon kaj simpation de tiuj homoj, lasante al ili multajn donacojn, kiuj ilin konvinkus pri la bonaj intencoj de la blankuloj. Anstataŭ tio, oni ekscitis la plej terurajn malamojn »,

Oni riproĉas al la enlanduloj grandan malbonmorecon, kaj ĉiu vojaĝa romanisto gustumigas tian rakonton al siaj legantoj. La realeco estas tute alia. Car en tia socia stato, la virino estas kvazaŭ proprajo de l'viro, tiu ĉi estas ekstreme jaluza. La monogamio ekzistas ĉe la plej multaj gentoj. Malofte la vidvino reedziniĝas. Oni akiras la konfidon de la enlanduloj nur montrante severan respekton al la virinoj. Se blankulo koniĝas, ke li rilatas kun Indino, oni lasas lin elekti inter la jenaj solvoj : aŭ li tuj foriros kun ŝi kaj ne plu reaperos en la gento, aŭ ŝi estos tuj oferita ; ĉe kelkaj gentoj, kiam la virino estas fraŭla. oni proponas al la blankulo, ke li aniĝu en la genton per solena ceremonio. La enlandulo montras grandan respekton kaj amon al siaj infanoj. Li indigniĝas, kiam li vidas, ke la blankuloj frapas siajn idojn. Carma kutimo ekzistas ĉe kelkaj gentoj : kiam fremdulo vizitas genton, virino kun infano ĉe la mano lin akceptas. La tuta gento akceptas la gaston tiel same kiel lin akceptas la bubo. S-ino Barbosa, dank'al la simpatio, kiun al ŝi montris la unua renkontita bubo, ricevis belegan akcepton ĉe la gento Krichanas, fama pro ĝia krueleco. Eble, funde de tiu kutimo, kuŝas rememoro de ia prapatra superstiĉo. Tiu amo al infanoj montras la malverecon de la rakon-

---

(¹) La dirita broŝuro, kiu enhavas ĉiujn necesajn detalojn estas nun en presado kaj tre baldaŭ aperos Oni povas ĝin mendi de nun, kunsendante 20 Sd·

(²) En la landoj, kie la nomo konsulo prezentas diversajn neoportunajojn, oni alprenu alian nomon : Esperanto-delegito, Esperanto-reprezentanto, k. t. p.

[1] La civilizeco neniel garantias la enlandulon, kiel pruvas la jena rakonto : Inda ĉefo de suda Argentina Respubliko, eksoficiro de kavalerio, ekloĝis en sia nasklando kaj instalis kampan espluaton. Pro tio, ke la tero, sur kiu ĝi troviĝis, estis dividita inter Italaj enmigrintoj per ministra dekreto, la maljuna ĉefo estis elpelita kaj liaj proprajoj donitaj al la koloniigantoj. Kun siaj du filinoj, li iris plendi en Buenos-Ayres, sed tute malsukcesis. Pri tio jurnalisto skribis : « La civila juro ne ekzistas pri la enlandulo ». Jen la ĝenerala opinio,

[2] Tiel estas nomataj la civilizitaj loĝantoj de la « sertuo » aŭ praarbaro. Ili kutime estas mestizoj.

toj de la ĉasistoj, kiuj el la arbaro dekondukas « vagantajn » Indidojn. En plej multaj okazoj, ili simple inside mortigis la gepatrojn, ĉar tiuj ĉi pli volonte mortigus siajn idojn prefere ol ilin fordoni al la blankuloj. Eĉ por la civilizuloj, la Indo estas io apenaŭ pli alta ol besto. Kiam S-ro Barbosa vizitis la Indojn, liaj konatoj lin petis : « Sendu al mi Indidon, Indidinon, dek sovaĝulojn por mia fabrikejo, dudek knabinojn por mia laborejo, k. t. p... » — « Mi ne riskas mian vivon kaj sanon por fariĝi sklavisto », respondis la scienculo. Tial, li faris al si multe da amikoj ĉe la Indoj, kaj multe da malamikoj ĉe siaj samlandanoj. M. V.

(Daŭrigota).

GERMANUJO

Frankfurt-a/M., februaro 1908.

Ĵus en la sama momento, kiam mi skribis mian lastan artikolon, okazis — kiel jam dirita — en Berlino, Frankfurto kaj en la plej multaj urboj de Prusujo manifestadoj de la laborista partio por la plibonigo de la balotleĝo en Prusujo. Eĉ la policanoj devis uzi siajn armilojn. La diritaj manifestadoj estis faritaj pro parolado de la Prusa ĉefministro, princo von Bülow, kiu parolis ĉe la germana imperia parlamento kontraŭ la plibonigoj aŭ ŝanĝoj de la balotleĝo. Mi kredas, ke la legantoj de tiu ĉi gazeto havos iom da intereso pri la nuna leĝo kaj mi volas peni ĝin klarigi al ili. La Prusa parlamento estas duobla. La parlamento konsistas el la unua ĉambro kaj la dua ĉambro. La unua ĉambro estas nomata « Herrenhaus » (domo de la sinjoroj), kaj la dua « Abgeordnetenhaus » (domo de la deputatoj). La unua ĉambro estas formata plejgrandparte per la reĝo mem kaj konsistas el membroj, kiuj estas elektataj de li mem kun hereda rajtigo, aŭ je vivdaŭro. En ĝi sidas la plenaĝaj princoj de la reĝa familio kaj la memstaraj princoj, la membroj elektitaj de la reĝo je vivdaŭro, naŭdek membroj, kiujn elektas la regnanoj pagantaj la plej multajn impostojn, kaj fine la tridek urbestroj de la plej grandaj urboj de Prusujo. La dua ĉambro kalkulas 433 membrojn. La balotdistriktoj estas difinitaj per la leĝo kaj povas konsisti el unu aŭ kelkaj distriktoj, aŭ el unu aŭ kelkaj el la plej grandaj urboj. Ĉiu Pruso, staranta en la dudeksesa jaro, havas la rajton elekti, nature nur se li posedas la burĝajn honorojn. Du cent kvidek ŝtatanoj povas elekti unu elektanton kaj la elektantoj estas dividataj en tri partoj, tiamaniere ke ĉiu parto enhavas trionon de la tuta sumo de la impostoj pagataj en tiu ĉi distrikto. La unua parto konsistas el tiuj elektantoj, kiuj pagas la plej grandajn impostojn ĝis la alto de triono de la tuta impostsumo ; la dua parto el tiuj, kiuj pagas la pli malaltajn impostojn ankaŭ ĝis la alto de triono de la tuta sumo de la impostoj, kaj la tria el tiuj, kiuj pagas la lastan trionon de la impostoj. Ĉiu parto elektas aparte kaj nome trionon de ĉiuj duagradaj elektantoj. La elekto ne estas sekreta, sed publika, kaj ĉiu elektanto devas laŭte diri la nomon de la duagradaj elektantoj, kiujn li volas elekti. La tiamaniere balotitaj elektas nun kun egala rajto la deputatojn. Tiu ĉi balotmaniero montras, ke la Prusoj ne havas egalan rajton, sed ke la riĉuloj en Prusujo estas plejprandparte la leĝofaristoj. Tio estas ankaŭ la kaŭzo, kial oni faras grandan propagandon por la plibonigo aŭ ŝanĝo de la balotleĝo. Esperable ne plu malproksima estas la momento, kiu donacos al ni novan egalan balotrajton ! H. FRICKE.

USONO

Seattle, Februaro 1908.

Multe diskutata temo en Usono nuntempe estas la vojaĝo de la granda kirasŝiparo ĉirkaŭ la kontinento ĝis la Pacifika flanko de la kontinento. Kredeble tiu estas unu el la plej fortaj ŝiparoj iam kunigitaj, kaj ĝia forsendo al la Pacifiko montras ke se milito okazos inter Usono kaj Japanujo, la unua certe intencas esti preta. Kompreneble la aŭtoritatuloj ĉe Washington forte asertash, ke ne ekzistas ia danĝero pri milito kaj plej verŝajne tio estas fakto. Por la Japanoj tia milito nepre estus tute malsimila afero kompare kun la milito kontraŭ Rusujo, Sendube la etaj brunhomoj de la insuleto estas bravaj, havas bonegan armeon kaj fortan ŝiparon. Ankaŭ ili havas multe da sperto gajnita de la du militoj, kiujn ili en la lasta tempo kondukis, dum la konfido akirita pro aliaj grandaj sukcesoj estas tre valora. Sed oni devus memori ke pli ol kuraĝo kaj konfido estas necesaj por gajni venkojn, ĉu terajn, ĉu marajn, kaj se la Japanoj havas la konfidon naskitan de konstantaj sukcesoj, tio same estas vera pri Usono. Ankaŭ tiu ĉi lando estas multe pli riĉa ol Japanujo, kiu ankoraŭ ne restariĝas post la grandega barakto kontraŭ la rusa urso. Plie la ŝipoj de Usono certe egalas tiujn de Japanujo laŭ forto kaj karaktero de la oficiroj kaj ŝipanoj, dum la nombro da ili estas pli granda. Estas supozebla, certe, ke en batalo inter la ŝiparoj, la japanoj povus venki, sed oni ne povas kredi, ke iliaj propraj ŝipoj ne estus malbone difektataj, kelkaj el ili probable subakvigataj. Tiuokaze estas malfacile kredi, ke la Japanoj povus konstrui novajn ŝipojn sufiĉe frue por malpermesi, ke la antagonisto povu altrudi al la japanaj insulaj urboj seriozegan punon, ĉar pro la nombro de ŝipkonstruejoj en Usono, ambaŭ ŝtataj kaj privataj, helpataj de la nemezurebla riĉeco de la lando, oni povus konstrui sennombrajn ŝipojn, ne nur ĉe la Pacifikaj urboj sed ankaŭ ĉe la Atlantikaj. Kompreneble la interligo inter Japanujo kaj Anglujo enkondukas alian konsiderindajon en la aferon koncerne kiu ne utilas pridiri. Se laŭ la konsento inter tiuj du landoj Anglujo venus al la helpo de Japanujo, la afero certe estus multe pli ĉagreniga por Usono, sed estas treege malfacila kredi, ke la angloj havas ian deziron enmiksi sin en tia la milito. Neniu dubas ke la ŝiparoj de la landoj kombinitaj povus detrui la ŝipojn de la respubliko, sed ĉu tio estus la fino de la milito ? Tute ne ; Usono estas grandega lando kaj eĉ se ili sukcesus surterigi grandajn armeojn, la ebla forto de iliaj kontraŭstarontoj estas praktike nemezurebla. Tamen ni esperu ke milito ne okazos, ĉar inter du grandaj nacioj tiaj, la rezultato estus terurega. Samtempe oni devas konsenti ke en la nuna tempo granda milito estus por la kapitalista klaso bonega profito, ĉar la mondlarĝa paniko nun ekzistanta estus tuj forigata. La fakto ke multege da junaj viroj perdus siajn vivojn tute ne modifas tiun esperon, ĉar ĉiuj bone konas, ke plej ofte en la kapitalista pesilo cento da homaj vivoj ne egalas unu dolaron.

Malgraŭ la certigo de multaj jurnaloj usonaj, la paniko daŭras akriĝi. Multaj firmoj jam bankrotis, miloj da laboristoj perdis siajn okupojn, kaj en kelkaj urboj jam necesiĝis starigi « supdomojn » kie malsatuloj povas havigi iom da manĝajoj senpage. En diversaj urboj oni provis marŝi procesie, celante altiri la atenton de la popolo kaj urboficiroj al la kondiĉoj de la malriĉuloj. Sed en Chicago la policestro malpermesis tian procesion, kaj kiam la kompatinduloj persistis marŝi, ordonis ke la policanoj arestu la partoprenantojn, kaj necese uzu pafilojn. Du rezultatoj de la paniko, kiuj la socialistoj jam de longe montris, neeviteblaj, tiaokaze jam montriĝas. Unu el ili estas la pleneco da mono, kaj la alia akra falo de prezoj. Ĉar tiom da homoj ne havas laboron, ili ne povas aĉeti komercaĵojn. Pro tio, fabrikistoj fermas siajn pordojn, forpermesante siajn proprajn laboristojn, tiamaniere kaŭzante la fermon de aliaj fabrikejoj, k.t.p., kaj ĉar neniu kuraĝas prunti monon por komercaj aferoj, la bankoj estas plenaj da ĝi, ne povantaj pruntedoni ĝin je ia procento. Kvankam la prezoj de vivnecesaĵoj ankoraŭ ne multe malpligrandiĝis, la movado ĉiam plirapidiĝas, kaj kredeble la tre malaltaj ciferoj de 1903 baldaŭ estos atingataj. Tamen tio ne helpos la malriĉulojn ĉar ili havas nek monon nek laboron.

Estos interese observadi la efikon de la paniko sur la politikan situacion. Ĉu la partio « republican » ree sukcesos daŭrigi la kontrolon malgraŭ la nuna mizero, ĉu la « democratic » kandidato sukcesos gajni la prezidantecon, la fakto ne estas disputebla ke ĉio favoras la socialistojn kaj tiu partio nepre gajnos multajn rekrutojn. La ordinara laboristo kutime pensas per sia stomako, kaj kiam tio estas plena da manĝaĵo, li tute ne povas pensi pri io, ĉar ne estas spaco por nova ideo samtempe. Nune, multaj el ili havas sufiĉe da tempo pensi stomake, ĉar tiu organo ne okupas sin alimaniere. Oni devas konfesi ke la metodo estas iom agoniiga, sed kutime efika !

Charles E. RANDALL.

Kroniko Politika

La tragedia morto de la reĝo kaj de la kronprinco de Portugalujo havis kiel konsekvencon antaŭvideblan la finon de la diktatoreco de Franco kaj la stariĝon de nova ministraro, kiu rezultas el provizora kunligo de la monarkiaj partioj ĉirkaŭ la trono de la juna reĝo. La eksdiktatoro forkuris, ĉiuj de li enkarcerigitaj politikistoj estis liberigitaj, nova Parlamento baldaŭ estos balotata, la interpartiaj bataloj, momente silentigitaj de la kontraŭdiktatora batalo, rekomenciĝis ; tiele finiĝis tiu tragedi-komedio, pri kiu niaj posteuloj verŝajne konservos nur tre palan rememoron. Malgraŭ la pacigaj ordonoj de la ministraro, oni suspektas, ke la nuna trankvileco estas pure provizora, ĉirkaŭ malfortika trono la politikistaj ambicioj libere elĉeniĝos, kaj ĉio reiros al la antaŭa stato de konstanta intrigado kaj parlamenta malgrandaĉa agitado.

El Marokujo, nenio nova ; daŭras la necerteco pri la rolo de la franca armeo kontraŭ la diverssultaneco, La Parlamento voĉdonas sinsekvajn konfidajn tagordojn al la regnestraro kaj, afero nuntempe pli absorba, sin okupas serioze pri la propono de laŭrenta imposto.

Kiel Marokujo por Francujo, tiel same Kongolando por Belgujo estas kaŭzo de gravaj priokupoj kaj necerteco. La Belga Parlamento ne ankoraŭ solvis la demandon pri la reakiro de la Afrika kolonio. kaj ne ŝajnas volonte akcepti tium maltekostan donacon.

Ĉu la Orientaj aferoj estus denove kaŭzo de internaciaj komplikaĵoj ? ĉiaokaze, ili estis kaŭzo de sufiĉe grava malkonsento inter Aŭstrio kaj Rusujo. La unua regno, iom liberigita je siaj internaj malpacoj, nuntempe klopodas efike pri iompostioma enokupado de Balkanujo ĝis la atingo de la haveno Saloniko, celo de ĝiaj ambicioj ; por ĉi tio ĝi uzas la fervojon, kiu, oni scias, estas la plej bona enpenetrigilo. Rusujo, iom malfrue, protestis. Ĉetere, tiu afero ne havos nun gravajn sekvojn, ĉar en la nuna tempo ĉiuj regnoj havas egalan intereson en tio, ke nenio estu ŝanĝata en Balkanujo ; el tiu ĉi ekvilibreco de la apetitemaj ambicioj, rezultas la ankoraŭa forteco kaj eltenemeco de la Turka imperio. Oni paroletis pri eventualeco de Ruso-Turka milito. sed tio estas pure antaŭtempa elpensaĵo ne pravigita. La regnestraro zorgos por ne rekomenci eksperimenton, kiu, pro internlandaj kaŭzoj, estu por si eble pereiga. Pri milito oni aŭdis la lastan eĥon de la rusa-japana milito, jam forviŝita de nia rememoro : la homo, kiun oni iam nomis heroo, nome G-lo Stæssel, estis mortkondamnita ; estas vere, ke la juĝistaro lin mortkondamninta petis la caron pri absolvo, citante la heroaĵojn de l'kondamnito.....

De tempo al temps venas al ni informoj pri la vojaĝo de le Usona militŝiparo ĉirkaŭ Ameriko ; ĉie ĝin akceptas la entuziasmo de la Sud-Amerikanoj ; baldaŭ ĝi atingos sian celon. Kaj dum ĝi naĝas sur la Pacifika maro, oni informetas nin, ke la Usona kaj la japana regnestraro interkonsentas, estas interkonsentontaj. Kiom da tempo tio daŭros kaj kiel ĝi finiĝos, pri tio nin avertas la naĝado de la militŝiparo sur la maro Pacifika.

A. R.

La Faktoj

4. Februaro. — Romo. — La kunsidoj de la Parlamento rekomenciĝas.

Lisabono. — Eksigo de la diktatoro Franco. Admiralo Ferreira stariĝas novan ministraron.

5 Lisabono — La konstitucio estas restarigita; la arestitaj deputatoj estas liberigitaj.

6. Altenburgo. — Mortas duko Ernesto de Saksujo Altenburgo.

7. Tangero. — Alveno de Mac Lean liberigita dank'al elpago da 150 000 Sm.

8. Romo. — Alveturas Patriarko de Antiokio Cirilo VIII^{a} por partopreni la jarcentajn festojn de Sta Johano Grisosotomo.

Lisabono. — Solena entombigo de la reĝo kaj de la kronprinco.

9. Italujo. — Inaŭguro de la dimanĉa ripozo en la tuta regno.

11. Nev-Jorko. — Forveturo de la 1ª aŭtomobilo por la kurado Nov-Jorko-Parizo.

Genuo. — Alveturo de la Portugala eksdiktatoro João Franco

Van (Azia-Turkujo). — Konflikto de la turkaj soldatoj kun Armenoj.

12. Romo. — Jarcenta rememorigo de Sta Grisostomo, festita per diservo en greka rito.

13 Romo. — Grava parolo de la Papo pri la unuiĝo de la orientaj eklezioj — Ministro Tittoni elmetas ĉe la Deputataro kolonian programon rilate Benadiro.

14. Maroko. — La hispanaj soldatoj okupas la havenon Marchica.

15. Valparaiso. — La Usona ŝiparo parade marŝas en la gulfeto antaŭ la prezidanto de Ĉilio.

Usono — Terura ciklono trairas la ŝtatojn Missisipi, Arkansas kaj Texas ; kelkaj lokoj estas ruinigitaj.

16. Vieno. — Barono Aehrenthal elmetas antaŭ la delegacioj la programon pri la konstruotaj fervojoj en Balkanujo.

A. TELLINI.

ESPERANTO

Internacia Esperantista organizo

En la mezo de februaro dua cirkulero estis sendita de la Iniciatintoj al la diverslandaj grupoj por la baloto de la delegitoj por la Internacia Esperantista Organizaĵo, nun en fondado. Ĝis nun la jenaj grupoj jam elektis delegitojn :

1. *Marseille* (Francujo). — S-ro D-ro Rapine, Esperanto-Konsulo.
2. *Armentières* (Francujo). — S-ro L. Baudet ; S-ro D-ro Briquet.
3. *Roanne* (Francujo). — S-ro P-ro Beau.
4. *Le Puy* (Francujo). — S-ro Ph. Hedde.
5. *La Rochelle* (Francujo). — S-ro Sam. Meyer, Esperanto-Konsulo.
6. *Görlitz* (Germanujo). — S-ro B. Küster.
7. *Düsseldorf* (Germanujo). — S-ro B. Luis.
8. *Magdeburg* (Germanujo). — S-ro F. Rockmann.
9. *Beziers* (Francujo). — S-ro A. Carles.
10. *Braunschweig* (Germanujo). — S-ro F. Schuck.
11. *Krakaw* (Aŭstrio). — S-ro B. Kuhl.

MOVADO ESPERANTISTA

Notindaĵoj.

Francujo : Nova grupo fondiĝis en Philippeville (Algerio) kaj voĉdonis deklaracion por la Fundamento. La grupo de Armentières preparas gravan ekspozicion kaj petas por alsendo de ĉiuspecaj Esperantaĵoj. — La konata franca revuo « Revue des Deux-Mondes » antaŭ kelka tempo publikigis artikolon de ekonomiisto Novicow kontraŭ Esperanto, artikolo rimarkinda pro la malklereco, kiun montras pri Esperanto ĝia verkinto, spite lia scienco. — *Germanujo* : Granda agado en la tuta lando ; ekzistas nun 43 grupoj aliĝintaj al la Germania societo. — *Rusujo* : La movado estas nun tre viglá en Polujo kaj Estlando, kie aperis novaj gazetoj. *Hungarujo:* La konsulejoj plimultiĝas, atentinda movado sur la bordo de Adriatiko, nome en Fiume, kie fondiĝis Adriatika Esperantista Ligo. — *Italujo* : Baldaŭ aperos en Romo nova Esperantista organo. — *Hispanujo* : En Katalunjo ekzistas lokaj grupoj en preskaŭ ĉiuj urbetoj. En Hispanujo prosperas pli ol 48 grupoj ; oni scias, ke la 5^{a} kongreso verŝajne okazos en tiu lando. — *Britujo:* Kiel kutime tre bonaj novaĵoj ; en Birmingham oni instruas Esperanton en kelkaj lernejoj ; en Londono fondiĝis Esperantista Drama Rondo. En Insulo Wight fondiĝis nova societo. — *Usono* : La serio de paroladoj de S-ro Privat trafas ĉiam pli grandan sukceson. La konata psikologo James estas favora al Esperanto kaj aliĝis al la Scienca Asocio ; en la daŭro de la jusa jaro, la Usono Esp. societo ricevis pli ol 40 000 leteroj pri nia afero. — *Sud-Ameriko* : En la okazonta scienca kongreso, en Santiago, la Esperantistoj kunvenos kaj faros specialan propagandon. — *Filipinoj* : Inter la anoj de la Filipina Esp. Asocio sin trovas la ministro de polico kaj komerco ; la ministro de Edukado promesis baldaŭ enkonduki en la lernaron de la altlernejoj Esperantan kurson, kiu havas egalan valoron kiel la alilingvaj. Oni ankaŭ verŝajne atingos, ke ĉiuj oficiroj de la militistaro studu Esperanton.

Gazetaro.

En Estlando (Rusujo) aperis nova gazeto, *Estlanda Esperantisto,* kiu informas pri la gravaj progresoj de niaj afero en tiu regiono (redakcio : Weike Kalamaja al. 7, Revel). — *Pola Esperantisto* aperas nun redaktata de konataj Esperantistoj : S-roj Leono Zamenhof, Bein, Belmont, Grabowski, k. t. p. ; tiuj nomoj sufiĉas por pruvi la gravecon de la nomita gazeto ; la unua ricevita nº estas tre interesa. — La Sveda organo « Esperantisten » eniras sian trian jaron ; niajn plej sincerajn bondezirojn por plua prospero. — En *Lingvo internacia* artikolo pri la kondiĉoj de nia unueco (Ordo en libereco) kaj tre bone studo de P. Corret pri « ŝajnaj konservativaj kontraŭdiroj » ; la ideoj elmetitaj en tiu lasta artikolo ŝajnas al ni neatakeblaj. — Pri la Delegacia afero ankaŭ raportis *Tra la Mondo,* la *Verda Standardo, Espero katolika, Germana Esperantisto,* k. t. p., sed la eĥoj do tiu afero nun feliĉe plimallaŭtiĝas, ĉefe post la trafa cirkulero de D-ro Zamenhof.

Bibliografio.

Ni tre rekomendas la interesan entreprenon komencitan sub la nomo « Esperanta Universala Biblioteko » (redakcio : Badapest, IX Ullöi-ut, 59), kiu celas liveri al le Esperantistaro malkarajn libretojn pri ĉiuspecaj temoj. Jam aperis « *La Mortontoj ĉin salutas* », « *Persaj Skizoj* », « *La Sukagiroj* », « *Ĉerkesaj rakontoj* », kolektitaj kaj tradukitaj de S-ro Davidov (prezo 15 Sd). — Nia angla samideano Cox aperigis bonan tradukon de la Araba rakonto : *Ali-BaBa kaj la kvardek rabistoj.* — S-ro Paolo Lusana, sub la titolo : « *Compendio di grammatica Esperanto* » verkis bonegan kaj originale faritan gramatikon de nia lingvo por Italoj · tute rekomendinda. — Ankaŭ rekomendinda estas la lernolibro verkita de S-ro Fr. Swagers el Antverpeno ; *Esperanto kaj la ĉiutaga vivo,* kiu kuniĝas la Gouin'an metodon pro ties logika idearo kaj la direktan pro ties interparola graveco ; tia metodo jam liveris tre bonajn rezultatojn (eldonejo : 33, rue Zirk-Anvers, 40 B). — Fine, aperis la traduko de « Unuaj lecionoj de Esperanto » en Rumana lingvo, trad. de S-ro G. Robin. — Ni ne forgesu citi la ĵus aperintan novan katalogon de la Esperantista librejo G. Warnier (Parizo) per kiu oni povas konstati la jaman riĉecon kaj diversecon de nia literaturo.

Kongreso.

La preparaj laboroj bone progresas. Speciala komisio baldaŭ komunikos la deziratajn informojn pri kostoj de l'vojaĝo, restado, k. t. p. La prezo de l'kongresbileto estas verŝajne 5 Sm. La restado en hotelo eble kostas 1 ĝis 2 Sm po tago ; por la manĝoj sama prezo. Esperinde, oni trovas privatajn loĝejojn malpli karajn. Pri la fervojoj, jen kelkaj fiksitaj prezoj por triaklasaj biletoj riceveblaj de agentejoj Cook, Stangen, k. a. El Amsterdamo 14.75 Sm, Budapeŝto

11.60 Sm, Genevo 19 40 Sm; por reiro oni duobligu la prezon. Kongresa Oficejo : Markstr. 68, Altona a/E.

ESPERANTO PRAKTIKA

Por la Esperanto-Oficejoj.

Al la Esperantistaj firmoj.

La Esperanto-Oficejoj pli kaj pli multiĝas en *Esperantio*. Tre ofte la Esperanto-Konsuloj, kiuj ilin starigis kaj direktas, skribas al ni por demandi al kiu oni povas sin turni por mendi la diversajn aĵojn, librojn, jurnalojn, revuojn, kalendarojn, ŝlosilojn, verdajn stelojn kaj pinglojn, esp. poŝtkartojn, k. a ... eĉ diversajn komercaĵojn surhavantajn la markon « Esperanto » (tabako, cigaringoj, k. c...) vendatajn en la Esp -Of.

Ni plezure informas niajn legantojn, ke ni kreas specialan servon por respondi tiujn demandojn. Ni respondas private, kondiĉe ke oni sendu al ni, krom poŝtmarkon aŭ poŝtkarton por la respondo, alian poŝtmarkon aŭ kuponon da 10 Sd. Al niaj helpabonintoj (vidu kondiĉojn de helpabono aliloke), ni respondos senpage. Por ke ni povu doni ĉi tiujn informojn kiel eble plej precize kaj akurate, ni treege petas ĉiujn firmojn (eldonistojn, gazetdirektorojn, k. a...) ke ili sendu al ni sian prezaron, kaj diru, se eble, kiom da rabato kaj kiajn ĝeneralajn kondiĉojn ili konsentas al la Esperanto-Oficejoj. Niaflanke, ni konsentas la saman rabaton al tiuj firmoj, por reklamoj en nia jurnalo. Plie, ni raportos kiel ĝis nun pri ĉiu nove aperinta eldonaĵo aŭ esperanta komercaĵo, kondiĉe ke oni sendu al ni specimenon.

ESPERANTO.

Esperanto-Konsuloj.

Novaj Konsuloj estis elektitaj en la jenaj lokoj :

Cloyes-s/Loir (Francujo). — S-ro Chauvin, farmaciisto.

Chester (Anglujo). — S-ro J.-W. Dobson, 51, Brook-Str. (Esp.-Of.).

Magdeburg (Germanujo). — S-ro F. Rockmann, Buckauerstr., 14. (Esp.-Of.).

Ettelbruck (Luksemburgo). — S-ro P. Hoen, komercisto. (Esp.-Of.).

Metz (Germanujo). — S-ro S. Bachimont, profesoro. (Esp.-Of.).

Rostow-Don (Rusujo). — S-ro D-ro Vejtcler, Tewerniekaja, 35.

Esperantaj Hoteloj.

Bethune (Pas-de-Calais — Francujo). — Hotel de France. R.

Bethune (Pas-de-Calais — Francujo). — Café Maillart, Grande-Place. P. K. R.

Saint-Amand (Nord-Francujo). — Hotel de Paris. P. K.

Douai (Nord-Francujo). — Hotel St-Jacques, place Carnot. R.

Henin-Liétard (Nord-Francujo). — Hotel Lemire-Hugo, 13, rue de la Gare. R.

Lille (Francujo). — Hotel de Russie, rue Faidherbe. R.

En *Parizo* fondiĝis sub la nomo *Esperantejo* (151, rue du faubourg Poissonnière) loko dediĉata al la interparolado de Esperanto ; ĝi estas ripozsalono enhavanta bibliotekon, ludojn, skribilarojn, k. t. p. Malfermata de 10 h. matene. La monata karto (20 Sd) donas rajton eniri la tutan monaton; la jara karto kostas 2,40 Sm; ĉiuj fremduloj estas petataj viziti la Esperantejon.

Esperantistaj vojaĝoj.

Kiom da Esperantistoj deziras paroli kun fremduloj kaj vojaĝi, sed ne povas iri al kongreso pro malproksimeco aŭ *pro ne taŭga libertempo*. Multe pli da ne Esperantistoj deziras vojaĝi ĉe fremdaj landoj, sed ne povas pro nescio de fremdaj lingvoj aŭ pro timo de izoleco. Ili lernus Esperanton, se tiu ĉi ebligus *tuj* facilajn vojaĝojn. Ĉiuj tiuj ĉi dezirantoj restas izolitaj, ne konataj inter si kaj ne povas grupiĝi por plenumi siajn dezirojn. Tial oni intencas ricevi ĉiujn demandojn, por grupigi ilin kaj formi aretojn, kiuj vojaĝos facile gvidate de unu aŭ du anoj, kiuj parolos la lingvon de la trairota lando; la iliaj parolos *nur* Esperante. Jam kelkaj Esperantistoj vojaĝis de grupo al grupo, de Esperantistoj al Esperantistoj, sed tiu agmaniero ne ĉiam taŭgas ĉar la vizitoj estas ofte tro okupataj, ne liberaj, *oni ĝenas, aŭ eĉ oni trovas neniun* kaj inter la urboj oni estas sola. Ĉiuj tiuj ĉi malfacilaĵoj malaperos per uzo de aretoj, kiuj povos *iri ĉie per siaj solaj rimedoj sen necesa ekstera helpo.* La personoj, dezirantaj fari ajnan vojaĝon, per esperanta areto, devas de nun sendi al S-ro Houssais (Iniciatinto de tiu entrepreno), professeur au lycée, Bourges (Francujo), peton dirantan : 1e Nomon, adreson kaj aĝon ; — 2e La lingvojn bone parolatajn ; — 3e Epokon kaj daŭron de la vojaĝo ; — 4e Landojn kaj urbojn trairotajn ; — 5e Specialajn dezirojn.

Oni kune metos la samlandajn kaj samtempajn petojn kaj tuj, kiam oni povos formi areton el ili oni sendos la nomaron kaj la petaron al la gvidonto, kiu organizos la vojaĝon. La rolo de gvidanto taŭgas por tiuj, kiuj ne povas fari grandajn vojaĝojn ; en ilia lando mem, ili uzos Esperanton. Tiu ĉi rolo estos facila, ĉar tial ke la anoj estas sendependaj, la gvidantoj estas nur tradukistoj. Kiu ne amas sian landon kaj plezurege ne admirigus ĝiajn belaĵojn, ĝiajn mirindaĵojn al fremduloj — En ĉiu areto estos, se eble, du gvidantoj pro la ebleco de manko de unu el ili kaj por ke la areto povu dividiĝi por specialaj vizitoj.

Konigu tiun ĉi organizon al ne-Esperantistoj kiuj ŝatas vojaĝojn. Per tio vi instigos ilin al lernado de Esperanto. Post du aŭ tri monatoj de *serioza fervora laboro, instigata per la proksimeco de la celo,* ili vojaĝos agrable per Esperanto. Ne prokrastu vian sendon de petoj, ĉar la interkonigo, organizado kaj peto pri informoj kaj *rabatoj* postulos kelkajn monatojn. Aliflanke, en la printempo taŭgas vojaĝoj en sudaj landoj ; la paska libertempo prezentas tre bonan okazon. Vojaĝu per Esperanto Kial vojaĝi sola aŭ kun samlandanoj ? La plezuro multobliĝos per interesa komunikado de impresoj inter tre malsanaj personoj.

Komerco.

La jenaj firmoj korespondas per Esperanto :

St-Amand (Francujo). — J. Bouillon (bicikledoj, fonografoj) P. K.

St-Amand (Francujo). — E. Paintiaux (ferlitoj). K.

Douai (Francujo). — A la Maison-Bleue, P. K.

Douai (Francujo). — Bergogne (pluvombreloj). K.

Le Mans (Francujo). — Chaumier-Daniélon. K ; Leroux-Tillé (porcelano). K.; Laporte. K.

Genevo (Svisujo). — Gutknecht (tajloro). P. K. ; Zoellner (presejo). K. ; Kündig (presejo). K.

Oni bonvolu sendi al ni ĉiujn nomojn de tiaj firmoj.

Kongresoj.

Dum lasta kunveno de la internacia komitato de diamantlaboristoj, unu el la estroj de la Antverpena grupo, D-ro Hoesser proponis, ke la uzado de Esperanto estu deviga ĉe la kongreso de la diamantistoj okazonta en Amsterdamo dum la proksima jaro. Estas nun la demando elekti kiel eble plej baldaŭ la delegatojn ĉe la kongreso, kiuj disponas unu jaron por kutimigi al si la uzadon de Esperanto.

∴ La 1^{an} de decembro 1908 kunvenos en Santiago (Cilio), la 1^{a} Tutamerika Scienca Kongreso. Inter la delegatoj estas konataj esperantistoj kaj amikoj de nia lingvo. S-ro Villareal, Mendizabal, el Meksikujo, Albuquerque, el Brazilio. Nia bedaŭrata samideano. D Honoré, el Urugvajo, intencis prezenti al la dirita Kongreso proponon pri Esperanto. Li mortis, sed aliaj ne mankos por defendi nian lingvon, kiel jam faris D-ro Mendizabal en la medicina kongreso de Montevideo, la lastan jaron. En la kongreso mem, la amikoj de Esperanto kunvenos La devo de ĉiuj amerikaj esperantistoj estas klopodi apud la delegatoj de sia lando por ke ili konu nian aferon kaj estu simpatiaj al la proponoj.

(*Brazila Ligo Esp.*)

KORESPONDAĴOJ

Ni montru la verdan stelon !

Estimata Sinjoro Direktoro,

Mi miras, vidante la malgrandan kvanton de samideanoj kiuj surmetas nian signon. Ĉu la veraj esperantistoj ne estus devantaj ĉiam porti ĉe la butontruo la verdan stelon ? Tio estas la plej bona propagando. Nur mi citas ekzemplon kiu okazis al mi mem. Estante en kafejo al kies mastro mi parolis kelkfoje pri Esperanto (ĉar, franco, mi parolas malmulte la anglan lingvon kaj kutime parolas en esperanto kun miaj amikoj) mi estis gaje surprizata kiam la mastro diris al mi. « Ho, oni vidas esperantistojn en Londono, hieraŭ estis tie ĉi unu sinjoro kiu havis sur si la verdan stelon kaj kiu montris al mi Hamleton en esperanto ! » Ĉu tie ĉi unu el miaj amikoj, promenanta en la Turo de Londono ne estis alvokata de unu gardisto, kiu vidinta lian stelon alvokis al li en Esperanto.

Se ĉiuj esperantistoj havus sur si la stelon tiuj agrablaj surprizoj estus pli oftaj ?

Samideanoj, ne kaŝu vian Esperantistecon !

L. de GUESNET,
(*Londono*).

⁂

La Varenne, Februaro 1908.

Tre estimata Sinjoro,

Permesu al ĉiutempa leganto submeti al via klera sperteco la kelkajn sekvantajn liniojn, pri kiuj mi insiste petas vian atenton :

La interŝanĝo de ilustritaj poŝtkartoj kun fremdlandanoj estas nun fariĝinta unu el la plej nerezisteblaj allogaĵoj de nia lingvo. Multaj estas jam la esperantistoj (precipe junaj) altiritaj al nia afero nur per tiu interkorespondaĵo, kiu aperis al ili en unua tempo kiel amuzaĵo, sed, poste, iom post iom, ilin incitis al plena lernado de la lingvo. Tamen, al la novaj nespertaj samideanoj (kaj iafoje al la malnovaj) la sendo de tiuj poŝtkartoj prezentas ofte iajn malfacilaĵojn, rilate al la skribo de la adreso, pro nacio pri la vortoj aŭ literoj naciaj korespondantaj kun tiuj esperante skribitaj en la anoncetoj. La eldonisto kiu bonvolus presigi folieton entenantan la kelkajn vortojn kiujn oni uzas en la adresoj, t e. (sinjoro, sinjorino, fraulino strato, placo, etaĝo, k. t. p.) skribitajn en ĉiuj Eŭropaj lingvoj, farus grandegan servon al multenombraj poŝkarte interkorespondantoj kaj malebligus ĉiujn poŝtajn konfuzaĵojn kiuj, pro nerespondo, ofte malkuraĝigas la novlernantojn,

Bonvolu akcepti, k. t p.

A. GAILLOT.

ESPERANTO-SOCIETOJ

Kontraŭ jara helpabono da 4 Sm. ni enpresas sen plia pago ĉiujn oficialajn komunikojn de la grupoj, kluboj, societoj, k. t. p. esperantistaj. Tiuj komunikoj estu kiel eble plej mallongaj. Ni instigas ĉiujn grupojn ke ili profitu tiujn speciale favorajn kondiĉojn kaj uzu nian gazeton kiel komunan perilon kaj interrilatigilon.

Federacio de la Esperantistaj Grupoj Burgonaj. — La Dijonana Grupo — centra grupo por la jaro 1907-1908 — sciigas la aliajn Grupojn federaciitajn, ke la regula Kongreso de la F.E.G.B. sidos en Dijon la dimanĉon 22^{an} de marto proksima. — Samtage, la dijonana grupo donos sian printempan feston, unua esperantista festo de la jaro. La programo estos sendita kiel eble plej baldaŭ.

ESPERANTO-KONSULOJ

Kontraŭ jara helpabono da 4 Sm. ni enpresas sen plia pago ĉiujn oficialajn informojn de la Esperanto-Konsuloj (Kreo, organizo, specialaj servoj farataj de ili, k. c.) kaj la anoncojn de la personoj, kiuj petas la servojn de la Esp. Of. Ni instigas ĉiujn konsulojn, ke ili profitu tiujn favorajn kondiĉojn kaj uzu nian gazeton kiel komunan perilon kaj interrilatigilon.

OFICIALA INFORMILO

Beaune (Francujo). — Esperanto-Oficejo, place de la Halle, deziras aĉeti originalajn propagandajn P. K. Sendi unu ekzempleron kun prezaro. Ĝi intersanĝas sian gvidfolieton Vendo de esperantistaj markoj. Adresoj de esperantistaj firmoj por mendo de bonaj vinoj. — *Konsulejo :* Piot, rue Carnot.

Le Creusot (Francujo). — Esp.-Oficejo, 20 place Schneider donas senpagan gvidfolion, vendas Esperantaĵojn (ilust. kartoj de la fabrikejoj). Merkredon vespere, esp. kunvenoj ĉe kafejo Morrot, rue d'Autun.

Châlons s/S. (Francujo). — Esp..Oficejo, ĉe Fino Blanchard, Boul. de la République. Gvidlibro, esperantaĵoj k. t. p.

Bradford (Anglujo). — Konsulo : A. T. Priestman, 12, Exchange Building.

Dover (Anglujo) — Konsulo : J. M. Finey, Admirality House.

Liverpool (Anglujo). — Esp.-Oficejo, 7 Berry Str. Vizitebla ĉiutage (vespere, marde kaj vendrede). Vendas Esperantaĵojn, abonigas Esp. gazetojn, liveras ĉiujn informojn. Oni petas, ke ĉiu Esperantisto uzu la la oficejon kaj librejon kiom eble plej multe kiel ejon por la profito de samideanoj.

Reims (Francujo). — Esp.-Oficejo, 5 Place Royale (telefono 436), Chauvillon, Konsulo Liveras ĉiujn informojn parole kaj letere pri Reims kaj la regiono : turismo, komerco kaj esperantismo.

PERESPERANTAJ SOCIETOJ

Marista Esperantista Ligo. — Tria listo de aliĝoj al la franca sekcio :

29 — Sinjoro Pierre Marly — Industriisto.
30 — Industria kaj komerca Societo esperantista en Francujo.
31 — Sinjoro Henry Gournay — Sipposedanto.
32 — Sinjoro Hedde — Ekssipoficiro.

Naciaj korespondantoj :

Anglujo — S-ro Southcombe — 16, Standford Avenue, Brighton.
Bulgarujo — S-ro Coĉo — Maŝinisto v/s Nadejda, Varna.
Danujo — S-ro Gunvar Monster — 54, B. Osterbrogrades, Kopenhago.
Finlando — S-ro Emilo Elenius — Suusarri.
Germanujo — S-ro Dro Mybs — 68, Marktstasse, Altona a/E.

La anoj de M. E. L ricevas la jurnalon Esperanto kontraŭ abonpago da 0,60 Sm (fr. 1.50). Petu la abonojn de la direkcio aŭ de S-ro Mesny, en Granville (Manche), Francujo.

AL NIAJ LEGANTOJ

Ni rememorigas al niaj abonantoj, ke nia gazeta jaro komenciĝas en monato februaro. Ni do petas ĉiujn personojn, kies abono finiĝas kune kun tiu N°, ke ili bonvolu *kiel eble plej baldaŭ* sendi al ni sian abonmonon, por eviti ĉian neutilan elspezon aŭ prokraston en la ekspedo de la jurnalo.

⁂ Ni petas ĉiujn niajn Agentojn, ke ili bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi al ni sian kalkulon kune kun la ŝuldita mono (eĉ la plej malgrandaj sumoj) ĝis N° 24 inkluzive, por la starigo de nia jara bilanco. Nova kalkulo estos malfermata al ili depost la 1^{a} de februaro 1908.

⁂ Ĉar la nombro de la ricevataj korespondaĵoj ĉiutage plimultiĝas, ni insiste petas niajn korespondantojn, agentojn, legantojn, k. a., ke ili bonvolu skribi al ni kiel eble plej orde, zorge apartigante ĉiun punkton traklitan en sia letero kaj ĉiam ripetante sian adreson. Tio multe faciligos nian laboron. Al la personoj, kiuj sendas presotaĵojn, ni insiste rekomendas, ke ili skribu legeble, nur sur unu flanko de la paperfolioj kaj lasante larĝan interliniajn spacojn. Oni ne povas imagi kiel ĉi tio ŝparas tempon kaj evitus... preserarojn.

⁂ Kelkaj personoj prave protestis kontraŭ tro oftaj preseraroj en nia teksto. Tio estas kaŭzata parte de tio, ke kelkaj manuskriptoj estas malbone skribitaj, parte de tio, ke nia gazeto estas presata tre rapide kaj kompostata en mallonga tempo. Tamen, ni zorgos por ke tiuj eraroj ne reapreu tiel grandanombre en la estonteco. Nia lasta N° estis presita po 2 eldonoj : unu difinita por la kutima legantaro, la alia por senpaga disdonado. En tiu lasta ensteliĝis bedaŭrindaj presararoj, kiujn ni malaperigis en la unua. De tio venas la plendoj de kelkaj personoj, kiuj ricevis la duan anstataŭ la unua.

⁂ De nun, ESPERANTO aperos la 1^{an} kaj 15^{an} de ĉiu monato (anstataŭ la 12^{an} kaj 27^{an}) ; ni petas niajn legantojn, ke ili bonvolu noti tiun ŝanĝon.

ESPERANTO.

ANONCETOJ

TARIFO

Korespondado. — Ĉiu enskribiĝo kostas 20 spesdekojn (fr. 0.75 ; 7 d. ; m. 0.60). Rabato da 25 °/₀ por 6 enpresoj kaj 50 °/₀ por 12 enpresoj. La literoj P I. montras la korespondadon per poŝtkartoj ilustritaj ; la litero L. montras korespondadon per leteroj; la literoj P M. montras interŝanĝon de poŝtmarkoj. Niaj abonantoj rajtas enpresigi senpage sian nomon unufoje.

Petoj et proponoj. — Ĉiu linio (40 literoj)

FELIETONO

MALFELIĈA KELRATO

(Monologo)

Mi estas malfeliĉa kelrato !... Kelrato oni nomas oficiston, kiu, per malhelpi la impostajn trompojn, devas kontroli la kelaron de vinvendistoj, brandfaristoj kaj ĉiuspecaj aliaj alkoholkomercistoj.

Do, mi estas malfeliĉega kelrato ! Kial ? vi diros al mi, kaj mi respondas : « Neniam vi divenos la motivon de mia malfeliĉeco. Mia urbo Beaune estas agrabla, trankvila, tute alloga. Mia edzino estas juna, beleta kaj tre aminda. Mi naskis tri geinfanojn tiel afablajn kiel mi mem. Eĉ mia bopatrino, mirinde ! mian vivmanieron aprobas kaj kun mi ĉiam konsentas. »

Kial do vi estas malfeliĉa ? vi rediros al mi, kaj mi denove respondos : « ĉar mi lernis la lingvon *Esperanto* ! ĉar mia edzino same la tro facilan Zamenhofan lingvon ! Fine, ĉar unu el miaj samurbanoj, profesoro *Rando* (Diablo lin forportu !) inokulis al mi la esperantistan mikrobon ! Ho ! la mizerulo ! »

Sed aŭskultu la aferon. La karnavalan tagon, mi diras al Sofio (mia edzino nomiĝas sofio) « Se ni irus Dijonon ? ni tagmanĝos en la restoracio, ni disĵetos « *confetti* » ni admiros la gajan bruan maskitaron, ĉu vi volas ? — Bonege! ekkriis Sofio, salteton farante.

Ĉarma vojaĝo ! tutan la vivon, mi memoros ĝin. Kiel fringoj ni ambaŭ ekbabiladis en la vagonaro. Ĉe nia preskaŭ plena fako, mi rimarkis malaltkreskan maljunulon kun arĝentaj okulvitroj sur la nazo, sed nazo vere burgonja, nazo ruĝa kiel tomato, ruĝa kiel rubenoj, ruĝa kiel kankro. Tial mi ne povis deteni min aldiri al Sofio — kompreneble en Esperanto por ke neniu povos kompreni — « Rigardu, mi petas, tiun nazegon de l'okulvitra maljunuleto. Mi kredas ke li ne akiris ĝin suĉinte glaciaĵojn. » — « Vi estas prava respondis mia edzino, kiu posedas tian lumigeman alpendaĵon, tiu ne bezonas lanternon dum la nokto. » — « Jes ! jes ! ankoraŭ mi ekkriis. Lia nazo estas vera flamingo elektrampolo, vera lumpoteto. Eble estas kartona falsanazo.

Post cent diversaj, ni eniris la Dijonan stacidomon. Tie, nian maljunan nazulon ni forlasis.

Finita la festo, mi rekomencis nian ĉiutagan laboradon. Sed, ho ve ! Hodiaŭ matene, mi ricevis la jenan leteron esperante skribitan :

Kara Samideano !

Mi havas la honoron sciigi al vi, ke, laŭ la oficiala decido de la ministro de financoj vi estas translokata de Beaune *ĝis* Saint-Flour [1]. *Post unu semajno, vi devas esti en via nova posteno. Eble en ĉiu urbeto, tre malmultaj estas la esperantistoj, kaj oni komprenos vin, kiam, en vagonara fako, vi ŝercos en Esperanto pri la nazo de viaj kunvojaĝantoj.*

Subskribita : X..., *Inspektoro, en Dijono,*
de la administracio de nerektaj impostoj,
kaj ..... esperantisto.

Vi komprenas, gesinjoroj, kial mi estas malfeliĉa kelrato, kaj kial, de nun mi abomenas Esperanton !...

BORD.

ANEKDOTOJ

« *La reĝo kaj la vilaĝano* »

La franca reĝo, Henriko IV^{an}, iam ĉasis. Li malproksimiĝinte el sia sekvantaro renkontis vilaĝanon sidiĝantan sur arba trunko apud la bordo de la vojo. — Kion vi faras tie ĉi ? diris la reĝo al la vilaĝano. — Mi atendas por vidi pasi la reĝon, respondis la vilaĝano. — Se vi volas rajdi sur la postaĵo de mia ĉevalo, diris Henriko, mi kondukos vin en lokon. kien vi senĝene rigardados la reĝon. Tiam la vilaĝano rajdas, kaj vojirante li demandas al Henriko : kiel mi rekonos la reĝon ? — Vi nur bezonos rigardi la personon, kiu lasos sian ĉapelon sur sia kapo, dum la ceteraj estos senĉapelaj. Henriko IV^{an} realiras la ĉasantaron tiam ĉiuj korteguloj salutas lin. — Nu !, li diras al la vilaĝano, kiu estas la reĝo ? — Ho ! tuj respondas la vilaĝano. estas sendube vi, aŭ mi, ĉar estas nur ni, kiuj estas nun ĉapelvestataj !

MORON J.

—o—

La malzorgeco.

La fama filozofo franca, Voltaire, havis junan serviston nomatan Jozefo, kiu estis iom malzorgema. Jam Voltaire ironte vojaĝi ordonis al sia servisto, ke li purigu liajn botetojn ; post ne longe Voltaire estas preta por piedvestiĝi, sed li surprize konstatas ke liaj botetoj ne estas purigitaj : tiam alvokinte sian serviston li diris : — Jozefo, kial vi ne purigis miajn botetojn ? — « Ho ! respondis la servisto, ne utilas ke mi purigu viajn botetojn ĉar post unu horo, ili estos tiel malpuraj kiel ili estas nuntempe. » Voltaire ne respondas, li sin piedvestas, kaj ŝlosinte la pordon de la manĝoĉambro, li deiras kunportante la ŝlosilon. Sed tuj Jozefo kuras al li dirante : « Mastra moŝto, mi petas vin, bonvolu doni al mi la ŝlosilon de la manĝoĉambro, por ke mi povu matenmanĝi. » Voltaire respondas : « Ne utilas ke vi manĝu, ĉar post unu horo vi estos tiel malsata kiel vi estas nuntempe. » Kaj li daŭrigis sian vojiron !...

MORON J.

---

[1] Restadejo ne dezirate de la oficistaro.

kostas 18 spesdekojn (fr. 0.25; 5 d.; m. 0.20). Rabato da 25 % por 6 enpresoj kaj 50 % por 12 enpresoj. Niaj abonantoj rajtas enpresigi senpage trilinian anonceton.

Komercaj reklamoj. — Ĉiu linio (40 literoj) kostas 16 spesdekojn (fr. 0.40 4 d.; m. 0.32). Rabato da 25 % por 6 enpresoj kaj 50 % por 12 enpresoj. Niaj abonantoj (speciale la hoteloj esperantistaj) rajtas enpresigi senpage trilinian anonceton.

NOTO. — Oni sendu ĉian anonceton antaŭ la 5a kaj 20a de ĉiu monato, ĉu al nia administrejo, ĉu al niaj lokaj agentoj aŭ al la Esperanto-Oficejoj. Oni skribu kiel eble plej legeble. Oni povas pagi per poŝtmandato, poŝtkuponoj internaciaj aŭ poŝtmarkoj. Ĉiu anonceto, ne akompanata de monsendo, ne estos enpresata. La Esperanto-Oficejoj estas petataj elmeti ĉiufoje niajn anoncetojn ĉe sia afiŝejo.

⁂

Korespondado

Le Mans (Francujo). — S-ro Chevallier, stenogr., 63, Rte de Ruandin. PI.

Maulleu (Kataluno-Hispanujo). — S-ro T. Castellnou PL.

Hinaconrt (Montescourt - Francujo). — S-ro Poreaux, instruisto.

Legny (Rhône-Francujo). — S-ro F. Vermorel, PI.

Praha (Bohemujo-Aŭstrio). — S-ro J. Loh, 9, Tynska Str. P. (kaj jurnaloj).

Anzin (Nord-Francujo). — S-ro Audin, 239, rue de Condé. PI.

Anzin (Nord-Faancujo). — S-ro Gruson, 51, rue de Thiers. PI.

St-Denis (Seine-Francujo). — S-ro Formani, 17, rue de Franciade.

Teya (Barcelona-Hispanujo). — S-ro T. Botey (ĉefe kun ne-eŭropanoj).

Everett (Mass. Usono). — S-ro G. Harrison 15, Prospect-Str. (kun eŭropanoj).

Bonrg (Ain-Francujo). — S-ro J. Gonod, Ecole normale. PI.

Pirdop (Bulgarujo). — S-ro H. Krestanof. PI, PM.

Bourg (Ain-Francujo). — S-ro A Millet, Ecole normale. P. PM.

Anzin (Nord-Francujo). — S-ro Z. Hanon. PI.

Bourg (Ain-Francujo). — S-ro C. Chevrot, 7, rue Edgar Quinet. PI. PM.

St-Denis (Seine-Francojo). — F-ino Simonot, 7, rue du Jambon PI.

Lippstadt-i/West (Germanujo). — S-ro Nehremheim, Sveststr., 42. PI.

St-Denis (Seine-Francujo). — S-ro J. Goëtsch.

Vienne (Isère-Francnjo). — S-ro Bouzon, 21, rue Voltaire-Huline, 30. PK.

Drobin (gub. Plocka-Rusujo). — S-ro Jan Muszynski. L

Geising-b/Dresden (Germanujo). — F-ino G. Heinel. PK.

Reims (Francujo). — S-roj E. Josselin, L. Josselin, L. Marguet, Deschauwer, Vincent, Moreau, PI. (Adresu la korespondaĵojn al: S-ro Moreau, 15, boulevard de la Paix.

Douai (Francujo). — S-ro H. Coppin, 3, rue Cuvette.

Sabadell (Barcelona-Hispanujo). — S-ro H. Marti, Trav. Lavadero, 22. PI.

Brus-s/-Forges (Seine-et-Oise - Francujo). — S-ro H. Dagnan, kastelo de Bligny. PI.

Prairie-du-Chien (Wix. Usono). — S-ro A. Horal PI.

Kremsier (Morairo-Aŭstrujo). — S-ro Vojtêch Nêmec. PI.

Meaux (Seine-et-Marne - Francujo). — S-ro Liévin, postes (pri sportoj).

Caen (Calvados-Francujo). — S-ro Lechevallier, 242, rue St-Jean. PI.

Wien (Aŭstrio). — S-ro Siebenscheim, stud. filoz., IV, 2, Alleegasse, 58-I (PI. Kun kongrespartoprenontoj) precipe studentoj.

Dijon (Francujo). — S-ro L. Durand. 1a artio. 3a bat PI.

Limoges (Francujo). — S-ro Valery, 44, cours Gay-Lussac PI.

Limoges (Francujo). — S-ro Grésillier, 44, cours Gay-Lussac. PI

Paris (Francujo). — S-ro G. Melo, 32, rue de Montmorency. P.

Amiens (Francujo). — S-ro Bréchet, 52, rue Victor-Hugo. PI.

St-Petersburg (Rusujo). — S-ro S. Petrov, B. Samsonjevsky, 62, k. 7. P. PM.

Roanne (Francujo). — S-ro Demont, help profesoro ĉe la Liceo. PI.

Petoj & proponoj

Inĝeniero. — (29 j.) Germano, kiu parolas ankaŭ france, angle kaj esperante, serĉas ian akcepteblan situacion en la eksterlando, prefereble en Parizo. Modestaj salajrpretendoj. Bonvolu skribi sub cifero 250, al la Redakcio de « Esperanto, 8, r. Bovy-Lysberg, Genève (Svisujo).

Poŝtmarkoj. — Vendebla belega kolekto da 1800 poŝtmarkoj, enhavata en belega albumo. Prezo: 35 frankoj. Sendo kontraŭ repago. Sin turni al S-ro Ferquel, 29, faubourg du Val-d'Ajol, Remiremont (Francujo).

Kristanaj Celantoj. — S-ro F.-W. Coulson, Esp.-Konsulo, 98, Freehold-St., Hull (Anglujo), « Kristana Celanto » volas korespondi kun neanglaj « Celantoj » pri tiu movado. Preferas ilust. p.kart. Respondas al ĉiuj samcelanoj almenaŭ unufoje.

Fotografantoj. — Mi deziras korespondi kun fotografamantoj fundamente ellernintaj optikan kaj kemian partojn de tiu scienco. Fotografaĵoj nepre devas esti preparitaj sur poŝtkartoj per la korespondantoj mem. Adreso: Rusujo, Voroneje gub., Kasennaja Palata, al Petro Krasnoborodkin

---

Gazetoj. — S-ro A. Grodzicki, Piaseczno Polujo, gub. Varsovia, tre deziras interŝanĝadi: revuojn, gazetojn; tuj respondos.

Poŝtkartoj. — La sobreca loĝio « Printempo » eldonis multekolorajn poŝtkartojn. sed *belegajn*, kiujn ĉiu samideano povas ricevi tute senpage sendante al la loĝio ilustritan poŝtkarton (urbvidindaĵon, pejzaĝon) al la adreso. Lars Bostroiis, Inedalsgatan, 7, A. IV. Stockolm (Svedujo).

Informoj. — Rondeto de Esp. studentoj volonte sendos ĉiujn informojn pri la bohema nacio (poŝtmarkoj por respondo) kaj serĉas korespondantojn por siaj anoj. Sin turni al R. Fankner, Hradec Krălove, Velkénàm, 36, Bohemujo-Aŭstria.

Kuracistoj. — « Glos Lekarry » (Voĉo de Kuracistoj), dusemajna pola gazeto por kuracistaj aferoj kaj por sociala medicino, eliranta en Lwov, malfermas prove, de marto 1908, esperantan fakon por internacia korespondado de kuracistoj kaj invitas ĉiunaciajn kuracistojn partopreni en tiu korespondado. Se la nombro de la korespondantoj estas granda, tio ebligos la vastigon de la Esp. fako kaj la kreon de aparta Esp. eldono. Ĉiuj korespondantoj ricevos senpage represaĵon de la Esp. parto. — Sin turni al: D-ro St. Mikolajski, ul. Spiadeckich, 6 Lwow (Galicio-Aŭstrio).

Junuloj. — S-ro Bernieu, 11, rue de l'Isle, Eu (Seine-Inf., Francujo) serĉas fremdajn gejunulojn, kiuj poŝtkarte korespondadus kun liaj Esperantistaj lernantoj; tuj respondos.

Korespondo. — S-ro L. I, poste restante, & C. R., poste restante, 51, Roanne (Francujo), deziras korespondi en angla aŭ esperanta lingvo kun dudekjaraj fraŭlinoj ĉiulandaj.

Unuiĝoj Kristanaj. — S-ao P. Hübner, inĝeniero, Friedrich-Wilhemstr., 66, Mülheim-a/R., petas por sciigo de junaj viroj pro grava atero.

Gazetoj. — S-ro H. T. Bailey, 31, Caversham-Rd, Kentisn Town, London, deziras ricevi malnovajn Esperantajn jurnajojn. Bonvole sciigu nomojn kaj prezojn. Ĉiu, kiu eldonos novan Esperantan gazeton estas petata sendi sciigon.

Grava alvoko. — S-ro Hana Fricke, korespondanto de « Esperanto » Niedenau, 30, Frankfurt-a/-Mein kaj S-ro F.-j. Havelka, akademiano en Leipzig, Emilienstr., intencas eldoni legolibron por komencantoj, S-ro Fricke verkas aŭ kolektas la rakontojn, fablojn, anekdotojn. k.t.p., kaj S-ro Havelka liveras la artajn ornamigojn. S-ro Fricke kredas, ke legolibro enhavanta artikolojn, k. t p., verkitajn por la tuta Esperantistaro, certe trovos la intereson de ĉiuj Esperantistoj, kaj petas ĉiujn amikojn de sia ideo pri kunhelpo La nova libro devas enhavi rakontojn k. t. p. de ĉiuj mondopartoj. S-ro Fricke jam korespondas kun eksterlandaj amikoj kaj esperas, ke ankaŭ la legantoj de ESPERANTO sendos al li manuskriptojn, por ke lia ideo baldaŭ sukcesu *La Esperantistaj gazetoj estas petataj represi tiun avizon.*

Franca lingvo. — S-so A. Motler, 57, Derby-Rd, Manchester, Weaste (Anglujo), volas korespondi kun Parizana janulo por spertiĝo en franclingvo.

Korespondo. — Max Bousquet, Roanne (Loire-Francujo), 3 jara kaj ok monatoj dankas koreĝe la multajn gesamideanojn, kiuj honoris lin per postulo de lia fotografaĵo. Li ĉiufoje sendis portreton al la postulintoj, sed li atendas ankoraŭ kelkajn ricevavizojn. Li estus feliĉa ricevi pliajn sendaĵojn precipe el ekstereŭropanoj.

Malnovaj jurnaloj. — G. Davidov, Rusujo, Saratov, kesto, 12, deziras aĉeti:

1. « Cilio Esperantista » pagos po 50 centimoj por ĉiu n-ro (por ĉiuj jaroj). 2 « La Pioniro » india, pagos altan prezon. 3. « Esperanto » de San ander, pagos altan prezon. 4. Librojn no 3, 4, 8, 9, 13 22, 23, 25, 20, 32, 34, 39, 40.

Bibliofiloj — S-ro Philippe (agento de « Esp »), en Aubry, Nord (Francujo) dankas la multajn respondintojn al U.B.; kiuj baldaŭ ricevos provan No de l'nova esperanta gazeto kun plenaj klarigoj pri l' *Unuiĝo de bibliofiloj*.

Poŝtkarloj. — Sendu 80 spesdekojn al S-ro Pion. Sté Générale, Beaune (Côte-d'Or, Francujo) kaj vi ricevos belan kolekton da 13 ilust. kartoj esp. de Beaune.

Komercaj reklamoj

Libreldono. — H. Thilander, Blindula presisto de punkte-skribitaj libroj aĉeteblaj ĉe li Majorsgatan, 12 Stockholm (Svedujo).

Esperanta-angla vortaro de A. Motteau 260 grandaj paĝoj interpunktitaj, fortike binditaj en unu grandega volumo aŭ en du paperkovritaj volumoj, bona helpeto al diverslandaj esperantistoj, kiuj volas skribi anglan lingvon, prezo afrankite fr. 9 00.

« Verpersentiĝo », beleta kanto kaj kun fortepiano kaj kun svedaj kaj esperantaj vortaj, kantita en la kongreso en Cambridge, prezo fr. 0 40.

« Johannisborg », kortuŝanta historia rakonto interlinie presíta, prezo fr. 2 50

GEVIDULOJ, — Aĉetu kaj donacu al blindulaj gekonatoj!

Pension-Hotelo. — *Bad-Nauheim* (Germanujo, « Villa Saussoni », pension-hotelo. Bismarck, 19. Posedanto, Ed. Förster, informejo por Esperantistoj Moderaj prezoj pensionaj aŭ senpensionaj, proksime de la banejoj, ŝprucakvoj kaj kurparko, grandaj altaj ĉambroj, komforte meblitaj (precipe bonegaj litoj). Atentema servado. Oni parolas kaj korespondas Esperante.

Reklamo, — S-ro C.-A.-G. Browne, reklamagento, 53-54, Wych-Street, London, W. C. (Anglujo), deziras korespondi kun Esperantistoj pri anoncado en britaj, koloniaj kaj fremdaj jurnaloj.

En 3 minutoj vi povas gajni 20 Spesmilojn

Esperanto Februaro.
Detranĉu tiun koponon kaj sendu ĝin kun via respondo

partoprenante la ludon de la Limeriko.

Tiu ludo certe interesos ĉiujn Esperantistojn, ĉar ili povos ricivi monan premion da 20 Spesmiloj, kiel rekompencon de triminuta pripensado.

Kondiĉoj de la « Limeriko »

1. — Aldoni al la jenaj kvar versoj unu verson, kiu rimos kun la unua kaj havos la saman nombron da silaboj.

Iam, pluv' alparolis venton.
« Batati mi havas la tenton
Por fini la vian influon. »
La vento respondis sen bruo :
. . . .

2. — Sendi, kun tiu verso: *a)* sian nomon kaj plenan adreson; *b)* mandaton aŭ poŝmarkojn po fr. 1,25 (1 ŝilingo, 1 marko, 50 spesdekoj); *c)* la kuponon kiu estas en la angulo de tiu ĉi teksto al

LA LIMERIKO. LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO
15, rue Montmartre, Paris.

3. — Oni devos sendi la verson antaŭ la fino de Marto. (Se du versoj estas egale bonaj, la unue alveninta ricevos la premion.)

4). — La juĝistoj estos S-roj Gabriel CHAVET kaj PUJULAS-VALJES.

5). La plej bona verso revos monan premion da 20 spesmiloj.

6. — La nomo de la gajninto estos publikigata ĉiumonate en tiu ĉi jurnalo.

Liverantoj de Mustardo kaj Amelo al la Reĝo

Laŭ privilegio

J. & J. COLMAN

(Akcia Societo)

MANUFAKTURISTOJ DE

MUSTARDO, AMELO, BLUIGAĴO

KAJ

BRITA RIZFARUNO

108, CANNON STREET, LONDON
kaj CARROW WORKS, NORWICH (Anglolando)

Rubandoj

Speciala fabrikejo por rubandoj, ordenaj bandoj francaj kaj fremdaj.

Laŭ mendo la firmo povas fabriki kiajn ajn rubandojn por industristoj kaj komercistoj, bandojn por ordenitoj, insignojn por societoj, kongresajn framasonajn rubandojn.

Louis Reynaud

16 et 20, place Jacquard, St-Etienne (Loire) *France.*

FELIETONO DE "ESPERANTO" 2

LA LIBRO DE ESTER

Originale verkis

A. KOFMAN

— Kial la religio malpermesas parigi bestojn de diversa speco?

— Car la granda Itah, la mastro de la mondo, kreinte la bestojn, volis. ke ĉiu kreaĵo nasku sian similon. Se oni geedzigas hundon kaj katimon, serpenton kaj azeninon, muŝon kaj elefantinon, tiam aperus novaj specoj de bestoj, kio estus kvazaŭ riproĉo, ke la granda Itah ne povis krei ilin.

La hindo malaperis. Lian lokon prenis greka asklepiano, kiu demandis hebrean mediciniston:

— Kial la virinoj havas sonorantajn kaj akrajn voĉojn?

— Car Evo estas kreita de ripo. Frapu sur oston, kaj ci ricevos sonon laŭtan kaj akran. Kontraŭe, Adam estas farita de tero, de argilo. Frapu sur la teron, kaj ci ricevos sonon surdan, malakran.

— Kial la virinoj volas havi infanojn?

— Car la patrinoj remetas ĉiujn malbonaĵojn, kiujn ili mem faris, sur siajn infanojn. Se ili rompas vazon, formanĝas daktilojn, falas kun vinkruĉo, la kulpo estiĝas al la infanoj, kaj la patrinoj liberiĝas de la puno.

Sur la sceno aperis filozofoj: kartagenano kaj arabo. La kartagenano demandis:

— Kial la virino estas pli malica, pli malmola, pli venĝema ol la viro?

— Car laŭ la dirito la virino estas farita de osto, dum la viro de argilo. Metu sur la teron akvon, kaj ĝi moliĝos, metu sur oston akvon, kaj ĝi restos sen ŝanĝo.

— Kial la viro serĉas la virinon kaj ne male? Kial la virino atendas la iniciativon de la viro?

— La virino estas farita de lia ripo, kiun li perdis. La virino nenion perdis, kaj ŝi ne serĉas.

— Kio estas pli malbona: pensoj pri seksa peko aŭ la seksa peko mem?

— Pensoj pri peko estas pli malbonaj, ĉar se la peko estas farita, la pensoj pri la peko kaj la peko mem ne havas plu lokon. Sed kiu pensas pri tiu ĉi peko, havas ĉiam malbonajn pensojn kaj la peko estas ankoraŭ farota.

Post tio ĉi la interparolado fariĝis komuna, kaj ĉar la lasta temo rilatis virinojn, oni vigle parolis pri ili. Ĉiu naciano laŭdis la virinojn de sia lando, levante ilian belecon ĝis la sepa ĉielo. La reĝo aŭskultis ilin ridetante kaj miksiĝis en la disputon.

— Viaj virinoj estas tre belaj, — li diris — ĉar mi konvinkiĝis je tio, havante en mia haremo la plej diversajn specimenojn. Sed estas unu trezoro de la ĉieltenanto Ormuzdo, donaco de la genioj Amŝaspandoj, kiu ne estas superebla. Tio ĉi estas mia ĉefedzino, la reĝino Vaŝti, la plej bela virino en la mondo. Tiuj ĉi vortoj estis sekvitaj de bruo. La ruĝaj kaj nigraj vinoj tumultigis la kapojn kaj perdigis al ili la timon. Sed Ahaŝveroŝ ne koleris. Nur lamanta argumento bezonas apogon de bastono. Li diris:

— Se vi ne kredas, mi tuj montros al vi la reĝinon. Eŭnukoj! Mehuman, Bizta, Harbona, Bigta, Abagta, Zetar, Karkas, venigu la reĝinon Vaŝti! — Tio ĉi ne estas pruvo! — kriis la ebriiĝintoj. — La reĝino havas tualetojn, kiuj beligas ŝin pli ol la naturo volas. Se ni havus la rimedojn de la reĝo Ahaŝveroŝ, niaj virinoj estus ankoraŭ pli belaj! — Eŭnukoj! — ordonis la reĝo, — Venigu la reĝinon Vaŝti sen kia ajn tualeto. Ke ŝi aperu tie ĉi en la sia naturo, kiel la patrino ŝin naskis!

III

Tiutempe la reĝino Vaŝti festenis en la virinejo kun siaj amikinoj; ŝi estis la filino de la granda reĝo Evil-Merodaĥ, nepino de la pli ankoraŭ granda Nebukadnecar kaj sciis ŝati sian fieran devenon. Tial, kiam la sep senditoj venis al ŝi kun la ordono de la reĝo, ŝi kriegis de honto kaj de kolero, gratis al si la vizaĝon kaj ŝiris al si la harojn dum la amikinoj pro kunsento faris al si la samon. La fakto estas ke la reĝino Vaŝti rifuzis obei la reĝon. La saĝuloj donas diversajn argumentojn por klarigi tiun rifuzon. Unuj diras, ke la reĝino estas tro fiera por konsenti montriĝi nuda antaŭ fremdaj viroj. Aliaj afirmas ke ĉar la savo de la hebreoj kondiĉis la nevenon de Vaŝti, la anĝelo Gabrielo kreskigis sur ŝia frunto voston, kio metis ŝin en neeblon plenumi la ordonon de la reĝo. La rifuzo de la reĝino enterurigis ŝiajn amikinojn. Oni sciis, kio estis malobei al la reĝo. Cetere, la reĝino ankaŭ ĝin sciis, sed ŝia fiereco estas pli forta ol ŝi. Komprenante, ke ŝi estas perdita, ŝi almenaŭ volis sin venĝi kaj sendis al la reĝo fidelan sklavon, en kies buŝon ŝi metis la maldolĉecon de sia ofendita koro kaj la koleron de sia insultita deveno.

La sklavo fleksis la genuojn apud la trono kaj diris malĝoje, sed firme: — Reĝo de reĝoj, sunklara Ahaŝveroŝ, protektanto de la agloj, kokoj kaj hundoj! Ke Buŝankto, la flava demono, kiu faras la homojn dormeñaj kaj maldiligentaj, ne tuŝu cin! Ke la serpento Azis ne mortigu cin dum la dormo! Ke Ahriman forigu de ci la malbonan diinon Nacus, kiu faras la homojn malpuraj, kiam ili mortas! Mi tuj ripoŝtos al ci la vortojn de la reĝino Vaŝti, la reĝino de la reĝinoj. Mi estas la lango, sed ŝi la parolanto; mi estas la buŝo, sed ŝi la pensanto; mi estas la vazo, sed ŝi la enhavo. Mi plu ne estas mi, mi estas ŝi! Aŭskultu do, reĝo Ahaŝveroŝ, kion mi, la reĝino Vaŝti, diros al ĉi! Mia patro Evil-Merodaĥ sciis trinki pli ol mil homoj kaj malgraŭ tio li ne parolis sensencaĵojn dum Ahaŝveroŝ, trinkante iom pli ordinara homo daŭre nur cent okdek sep tagoj, metas sian langon en konflikton kun la prudento. Ci volas, ke mi iru montriĝi al la popolo kaj al la sinjoroj? Ĉi malsaĝulo! Se aliaj virinoj estas pli belaj ol mi, ĉu Ahaŝveroŝ ne restos mensogulo? Eĉ la trono de Solomono la Saĝa, kie ci sidas, ne faris cin prudenta. Kaj tamen tiu ĉi trono povus helpi. Solomono sciis la lingvojn de ĉiuj bestoj, de birdoj, de insektoj, de diabloj kaj parolis kun ili, kaj ĉiuj vivaĵoj alportis al li tributon: la manĝeblaj bestoj propravole kuris al la buĉejo kaj petegis, ke oni ilin pretigu por la festenoj de Solomono; la birdoj plezure enflugis la kaĝojn kaj la fiŝoj ĵetiĝis sur la patojn por esti fritataj, jen kio estis la trono de Salomono! La malamikoj fariĝis liaj amikoj, kaj la reĝoj venis por lerni de lia saĝeco.

(*Daŭrigota*).